

SVISA ESPERANTO - SOCIETO


INFORMAS

N-ro 6/1993

NOVEMBRO-DECEMBRO

SOLEMAN

KRISTNASKON



FELIĈAN

NOVAN JARON

deziras al ĉiuj membroj kaj geamikoj

LA SVISA ESPERANTO - SOCIETO
kaj LA REDAKCIO DE SES INFORMAS

GRUPAJ INFORMOJ

BELLINZONA

Ĉiam la unuan sabaton en Viale Motta 32, je la 17.00h. Ĉiu estas bonvena.

ESPERANTO-SOCIETO BERN:

En restoracio AL FORNO, Spitalgasse 37.

2.11.19.30h kaj 7.12.19.30h.

Informo: S-ino M.Guldin havas novan telefonnumeron: N-ro 031/381 56 74.

ESPERANTO-SOCIETO BIEL:

17.30-1830h ĉiun vendredon en restoracio MANDARIN, Dufourstr.41.

LUZERNA ESPERANTO-SOCIETO

En restoracio Simplon Habsburgerstr.16 kaj en Big Ben, Winkelriedstrasse 39.

4.11. en Simplon:

1930-20.00h paroliga leciono, gvido F.Brügger.

20.00-2020h libera babilado

20.20-20.45h interŝanĝo de informoj, poste parolado de Istvan Morocz, pri: Personaj travivaĵoj kun Julio Baghy, la fama poeto hungara.

10.11.14.00-16.00h paroliga kunveno en Big merkredo Ben. Gvido Franz Brügger.

25.11.20.00h en restoracio Simplon: Parolos ĵaŭdo Andy Künzli pri:

1. Svisa Esperanto-Leksikono

2. Esperanto-propagando en la regiono de Luzern.

15.12.14.00-16.00h Paroliga kunveno en Big merkredo Ben. Gvido Franz Brügger.

ESPERANTO-SOCIETO NEUCHÂTEL:

Ĉiumonate iun vendredon, laŭ ebleco de la membroj.

ESPERANTOKLUBO WIL:

En restoracio Schweizerhof, Bahnhofstr. 18.

3.11.20.00h Ernst Glättli parolos pri: merkredo 40 jarojn de FISAIC (Federacio

de kulturaj fervojistaj societoj)
kun lumbildoj.

- 2.12.20.00 en restoracio Schweizerhof.
N I K O L A O - V E S P E R O.
Gvidos ĝin Leonie Sennhauser kaj
Barbara Pochanke.

ESPERANTO-SOCIETO BASEL:

- 25.11.20.00h Monata kunveno ĉe Berthe Spalinger, Egertenstrasse 11, en Reinach. Ni daŭrigos la tradukadon de ludó (kvarteto) kaj ni kiskutos pri la jam farita traduko pri Basel. (kiel nun daŭrigi?).
- 11.12.20.00h Monata kunveno en Riehenhof: ZAMENHOFA FESTO. (apartaj informilo kaj aliĝilo sekvos).

ESPERANTO-SOCIETO ZUERICH:

- 15.11.19.00h Monata kunveno en Karl der Grosse. (3-a lundo) LINGVA VESPERO PRI NEOLOGISMOJ:
- 29.11.19.00h Libera kunveno en kafejo Valentino, Münstergasse 4.
- 13.12.19.00h J A R F I N A F E S T E T O ;
T A G O D E L A L I B R O :
Gesinjoroj Weidmann invitis al TIU JARFINA ARANĜO ĈE ILI HEJME; en Eisengasse 22, 8008 Zürich. Ĉiuj estas kore bonvenaj. De Bellevue tramoj 2 aŭ 4 ĝis la haltejo Kreuzstrasse.

oo0oo

La Esperanto-Societo Zürich deziras al ĉiuj membroj kaj geamikoj belan kristnaskon kaj bonan novan jaron 1994.

oo0oo



internacia
LA SUNO PACIFIKA

La jaro 1993 ĝis 1994

OHBA Shigeko (Tokio)

Jen venas la nova jaro. En ĉiuj landoj en la mondo estas okazaĵoj aŭ festoj por la nova jaro. Hodiaŭ mi parolas pri la okazaĵoj en Japanio. En nia lando Japanio estas du aferoj en jarfino kaj jar komenco, nomataj "ŜIUASU 師走" kaj "ŜOOGACU 正月". En decembro oni povas aŭdi la vorton "ŜIUASU". Tio estis la nomo uzata por decembro en la malnova tempo, kiam Japanio sekvis la lunan kalendaron. Nun ankoraŭ vorto ŜIUASU estas uzata por signifi la lastan monaton de la jaro aŭ jarfino. Estas tre interesa populara onidiro, kial decembro estas "ŜIUASU":



[Per okuloj ↑]

[Per lango/ OSEĈIO →]



Ĉar decembro estas la lasta monato de la jaro, vendistoj de malnova tempo kuris kaj kuris tien kaj reen kun kalkulo-kajero 大福帳 . ŜI 師 signifas instruiston kaj ŬASU 走 havas signifon kuri. En aliaj vortoj, ŜIUASU estas la tempo, kiam eĉ instruisto, kiu estas normale ĝentila kaj kvieta, devas ĉirkaŭkuri por plenumi ĉion bona. ŜOOGACU 正月 havas la signifon de unua monato de la jaro, kaj ideografiaĵo ŜO 正 esprimas ĝustan kaj GACU 月 estas la luno aŭ monato. Festante la unuan monaton de la jaro, ĉirkaŭ 2 aŭ 3 tagojn oni pasigas tempon nelaborante. Kiel oni festas? En malnova epoko per tri punktoj de la vizaĝo, nome okuloj, oreloj kaj lango oni ĝuas ŜOOGACU. Homoj vidas belajn vestojn per okuloj, per oreloj interesan rakonton aŭskultas kaj per lango bongustan manĝaĵon gustumas. Tiuj tri punktoj devenas de tradicie hereditaj onidiroj.

Per okuloj: Virinoj surmetas KIMONO-n desegnititan multkolora kaj viroj ankaŭ en vira KIMONO de nigra kaj griza nomata HAORI-HAKAMA

Per oreloj: Por aŭskulti interesan rakonton oni iras al tradicia rakontejo, nomata YOSE 寄席 , bele vestite.

Per Lango: Oni manĝas tradiciajn kuiritaĵojn. Edzino, dommastrino, filino kaj aliaj virinoj bonorde enmetas manĝaĵojn en specialan keston OĴUU お重 kiu estas farita el ligno. Tio estas nomata OSECI.

Dank'al rapida ekonomia kresko de 60aj jaroj pli kaj pli malaperas supre menciitaj aferoj. Ĉar utiligante feriojn, junuloj, laborantoj, oficistoj kaj multaj aliaj homoj iras al skiado kaj vojaĝo al eksterlando. Sed ankoraŭ restas la afero per lango!

O S E Ĉ I O

(Rim. de red.) rigardu la bildon pri OSEĈIO)

JAPANESKA KUIRAJO SPECIALA EN NOVJARAJ TAGOJ

NAKANO KENJI (TOKIO)

Dank'al OSEĈIO oni povas ĝui novjarajn tagojn sen ĝeno prepari manĝaĵojn en la plej multaj familioj en Japanio. OSEĈIO estas speciala kuirajo japanstila por novjaraj tagoj. OSEĈIO estas ĝenerale preparita en la finaj tagoj de decembro, por kio dommastrino konsumas sufiĉan tempon, kaj pro ĝia konservebleco oni ne bezonas prepari manĝaĵojn dum la novjaraj tagoj.

Bazon de OSEĈIO okupas la kuirajo nomata NISIME, kio fariĝas el karoto, rafano, lapo, amorfofalo, rostita tofuo, laminario kaj aliaj, kune stufitaj kaj gustigataj de sojo, sakeo (jap.alkoholaĵo) kaj sukero.

* Krom NISIME oni nombras kiel OSEĈIO-n kamaboko-n, batatopaston kun maronpecoj, seki-
** gitan engraŭlon, kankron ktp. Aktuale ankaŭ ŝinko, kolbaso, fritajo de kokido, fromaĝo, k.a. inkluziviĝas laŭvole.

Antaŭe OSEĈIO estis manfarita de ĉiu homo respektive, sed nuntempe tujpreta aŭ jam elfarita OSEĈIO-ensemblojn oni povas aĉeti.

La sperto fari OSEĈIO-n bongusta kaj delikata estas pli kaj pli perdata for de japanaj hejmoj. Tre bedaŭrinde mi pensas.

* kamaboko estas japana pudingo el pistita fiŝaĵo en formo de kolbaso.

** engraŭlo estas anĉovo/sardelo.

"Nur 10jara, sed jam tradicia !

La Printempa Semajno Internacia (PSI) de Germana Esperanto-Asocio festos sian 10jaran jubileon

La 10a internacia familia semajno okazos inter la 1a kaj 9a de aprilo 1994 en la urbeto Junkerato (Jünkerath) en la germana regiono Ejfelo tuj apud la landlimo al Belgio kaj Luksemburgio.

PSI estas aranĝo por familioj, sed ne nur:

ankaŭ unuopuloj estas bonvenaj !

PSI estas aranĝo por Esperanto-parolantoj, sed ne nur:

ankaŭ komencantoj estas bonvenaj !

PSI estas aranĝo por turismemuloj, sed ne nur:

ni ankaŭ prelegas, diskutas, lernas, slojdas, ludas ...!

PSI eble estas aranĝo por Vi, sed ne nur:

*kunportu ankaŭ Viajn familianojn grandajn aŭ malgrandajn,
Viajn geamikojn kaj Viajn kursanojn !*

Petu tuj pliajn informojn de:

*Printempa Semajno Internacia
Wolfgang Bohr
Johannes-Kirschweg-Str. 11
D-53474 Bad Neuenahr-Ahrweiler
Germanio
telefono: (xx49)(0)2641/4885
telefakso: (xx49)(0)2641/4014*

ESPERANTO LIBRO-SERVO

Kultura Centro Esperantista Strato Postiers 27
 Centre Culturel Espérantiste Poŝtfako 779
 Esperanto-Kulturzentrum CH-2301 La Chaux-de-Fonds
 Centro Culturale Esperantista Telefono 039 26 74 07
 Center Culturel Esperantist Telefakso 039 26 62 03
 Esperanto Cultural Centre Poŝtĉekkonto 23-2921-8



MENDILO POR LA LIBROKATALOĜOJ DE

KULTURA CENTRO ESPERANTISTA

Mi/ni ŝatus mendi senpage la sekvantajn numerojn de la Katalogo de KCE (la mendo de la katalogo ne devigas aĉeti librojn):

- | | | |
|------|---------|--|
| /__/ | N-ro 1 | Lernolibroj, vortaroj kaj akompana literaturo por germanlingvanoj
Lehr- und Wörterbücher sowie weitere Literatur für Deutschsprachige |
| /__/ | N-ro 2 | Lernolibroj kaj akompana literaturo por franclingvanoj
Ouvrages disponibles pour francophones étudiant l'espéranto |
| /__/ | N-ro 3 | Lernolibroj kaj akompana literaturo por diverslingvanoj (i.a. en la itala, angla, hispana lingvoj) |
| /__/ | N-ro 4 | Internaciaj (t.e. nur esperantlingvaj) lernolibroj, facilaj legiloj, vortaroj, ktp.) |
| /__/ | N-ro 5 | Prozo (romanoj, noveloj, vojaĝrakontoj, antologioj, ktp.) |
| /__/ | N-ro 6 | Poezio (poemoj, versoj, teatraĵoj, antologioj, ktp.) |
| /__/ | N-ro 7 | Libroj por infanoj kaj gejunuloj |
| /__/ | N-ro 8 | Esperantaj movado, lingvo, historio, interlingvistiko |
| /__/ | N-ro 9 | Scienco, politiko, historio, religio, filo- zofio, geografio, turismo, ktp. |
| /__/ | N-ro 10 | Muzikkasedoj, lingvokursaj kasedoj, diskoj, kompaktdisko, vidbendoj, insignoj, glumarkoj, bildkartoj, T-cemizoj |
| /__/ | N-ro 11 | Literaturo en kaj pri aliaj plan- lingvoj (precipe: Ido, Interlingua, Occidental-Interlingue, Intal, Volapük) |

8-a INTERNACIA KULTURA ESPERANTO-FESTIVALO (ARTOJ)

Vendrede 12-an de novembro:

Festivalo de video-filmoj (en la sidejo de UFE):

- Prezento de la video-bendoj senditaj por la konkurso pri videobendoj.
- Proklamo de la rezultoj de la konkurso
- Prezento de filmoj kaj videobendoj i.a. la fama "Angoroj"

Komuna vespermanĝo en tipa pariza restoracio

Sabate 13-an de novembro:

Matene:

Vizito de kelkaj tipaj kvartaloj de Parizo

Posttagmeze:

- Inaŭguro de ekspozicio en la festivalejo
- Koncerto de Franz-Georg kaj Rita Rössler (Germanio): Popolmuzikaj influoj en la eŭropa klasika muziko
- Folkloraj dancoj
- Teatraĵo (anoncota)

Vespere: Rok- kaj malrokmuzika koncerto de SOLO(Hisp)

Dimanĉe 14-an de novembro:

Matene: Literatura forumo: La tradukita literaturo (kun partopreno de pluraj famaj tradukistoj de literaturajoj en Esperanto)

Posttagmeze:

- Teatraĵo: "La lasta nokto de Marie-Antoinette" de usona verkisto Joseph Bush, aktorita de Julia Castiau (Belgio)
- Varietea programo: kantoj el Afriko, skeĉoj el Novzelando, kabaredaĵoj el Francio....

La festivalejo estos ĉi-foje en Parizo mem, relative proksime al la sidejo de UFE.

Pluajn informojn vi povas ricevi ĉe: C. Nourmont, 2 am Kläppchen, L-5682 Dalheim. Fakso (352) 67 66 02.

Union Française pour l'Espéranto, 4 bis rue de la Cerisaie, 75004 Paris.

Estimata redaktoro/redaktorino de *SES informas*,

afable ni petas vin, ke vi aperigu en la organo redaktata de vi la ĉi-sekvan alvokon:

ALVOKO


**Homaranoj, registrigu senkoste vian adreson en
Tutmonda Homaranista Adresaro!**

La mondkonata verkisto Umberto Eco diris: "Kompare kun aliaj projektoj de internacia lingvo, malantaŭ Esperanto staras iu ideologio, kio klarigas kial ĝi eltenis dum la aliaj fiaskis. Ekzistas Esperanta 'religio', kiu igas homojn lerni kaj paroli la lingvon, dum ne ekzistas 'religio' de Volapük aŭ de Ido. La anglan oni lernas nuntempe pro praktikaj kaŭzoj. Sed povas ekzisti ideoj instigoj kiuj decidigas lerni lingvon, kaj ili estas fortaj." "Mi uzis la vorton *ideologio* en tre larĝa senco: aro de ideoj, de opinioj."

Zamenhof skribis: "Lingvo internacia havas la celon, krei inter la gentoj neŭtralan ponton en rilato **lingva**, la homaranismo volas krei tian saman ponton en **ĉiuj** rilatoj. La homaranismo estas nur plifortigita esperantismo, kaj ĉiuj tion ĉi sentas, kvankam ne ĉiuj volas tion ĉi laŭte diri."

Info-Servo celas ebligi kontakton inter ĉiuj, kiuj interesiĝas pri homaranismo. Tial ni preparas **Tutmondan Homaranistan Adresaron**. Se vi deziras registrigi vian adreson en tiu ĉi adresaro, bv. sciigi vian adreson al: **Info-Servo, Bismarckstr. 28, D-35037 Marburg, Germanio**.

Kun antaŭdanko kaj afablaj salutoj



Helmut Welger
Estro de Info-Servo r.a.

o o o o o

AL LA LOKAJ GRUPOJ II

Okazos baldaŭ bona ebleco por pripensi kaj pretigi la instruadon de Esperanto en la lokaj grupoj.

Sabate kaj dimanĉe la 6an / 7an de novembro 1993

ĉe ★ Kultura Centro Esperantista KCE ★

en La Chaux-de-Fonds

de sabate la tria posttagmeze ĝis dimanĉe tagmeze.

Gvidos tiun renkontiĝon Andres kaj Camille BICKEL. Andres ofte gvidis kaj gvidas kursojn en Ĝenevo. En kunlaboro kun sia edzino li pretigis tridekon da ludoj paroligaj. Dum la venonta renkontiĝo la partoprenantoj povos mem fari tiajn ludojn manlaborante, tiel ke ili povos kunpreni la novan instrumaterialon hejmen kaj poste uzi ĝin dum surlokaj kursoj, studvesperoj kaj aliaj.

Estus bone, se el ĉiuj lokaj grupoj venus unu persono.

Anoncu vian alvenon telefone ☎ 039 / 26 74 07 aŭ skribe:
KCE, poŝtfako 779, 2300 La Chaux-de-Fonds.



Venontaj aranĝoj ĉe KCE:
Oktobro 30-31 kun Andy KUNZLI
Novembro 27-28 kun Claude GACOND
Decembro 29-Januaro 3: novjara renkontiĝo





KOALICIA REGISTRARO DEBUTIS NASKIGO DE KOALICIA KABINETO DE HOSOKAWA

Permesu ion da politiko, por ni sciinda! (La red)

La inaŭguro en lundo de la koalicia kabineto estrita de la gvidanto de Japana Nova Partio, Morihiro HOSOKAWA formale finas 38 jarojn de unupartia regado de la Liberala Demokratia Partio. Li iniciatis gravajn ŝanĝojn en Japana Politiko.

Nove nomita ĉefa kabineta sekretario Masayoshi TAKEMURA anoncis la nomojn de la novaj kabinetaj ministroj tri tagojn post HOSOKAWA estis elektita kiel ĉefministro.

Post la anonco, HOSOKAWA parolis al raportistoj, ke lia administrado havas la respondecon antaŭenpuŝi reformojn. "Ni daŭrigos la bonan aferon de pasinta administrado kaj ŝanĝos aŭ reformos tion, kio devas esti ŝanĝita. La registaro ĉiam konsideros la popolon", li diris.

La membraro de la nova kabineto estas eksterordinara pro la fakto, ke escepte de Tsutomu HATA, kiu estis nomata vicĉefministro kaj ministro pri eksterlandaj aferoj, ĉiuj membroj tenas kabinetan pozicion por la unua fojo. Ankaŭ du nepolitikistoj estis elektitaj kiel ministroj de la kabineto same

kiel tri virinoj, rekorda nombro.

Kun tri virinaj nominatoj, la kabineto havas pli da virinoj en ĝi ol neniam antaŭa kabineto. Unu el ili, Ryoko AKAMATSU, estas antaŭa burokratino ĉe la Ministerio de laboristaj aferoj kaj antaŭa ambasadoro de Urugvajo. Aliaj du estas Manae KUBOTA, kiu ricevis la pozicion de ĝenerala direktoro de la instanco pri Ekonomia Planado, kaj Wakako HIRONAKA, kiu apartenas al Komei-partio kaj nun estas ĝenerala direktoro de la Instanco pri medio.

Aliaj ministroj el la privata sektoro estas Akira MIKAZUKI, emerita profesoro de Tokia Universitato pri juro, kiu servos kiel ministro pri justico.

Por formi sian kabineton HOSOKAWA ŝajnas, ke li serĉis certigi la stabilecon je efektivigo de politiko. Preskaŭ ĉiuj ŝlosilaj pozicioj estis donitaj al membroj de la Sinsei-partio, kiu apartiĝis de la Liberala Demokratia Partio, kaj estas la plej sperta je administrado.

La meznombra aĝo de la ministroj en la kabineto estas 59.4 jara, do 1.3 jarojn pli juna ol Mijazaŭa kabineto kaj la plej juna meznombra aĝo ekde la 1-a Sato-kabineto en 1964.

Japanio nun renkontas la turnopunkton kaj ĝia popolo forte deziras ŝanĝojn kaj reformojn en baldaŭa tempo.

(Shigeko OBA)

oo0oo

S E L SARLANDA ESPERANTO-LIGO INFORMAS, KE

de la 10-a ĝis la 12-a de decembro 1993 okazos la **42-a kultura semajnfino** de la Sarlanda Esperanto-Ligo (SEL). Laŭtradicie ĝi okazos en la Kardinal-Wendel-Domo en D-66424 Homburgo.

(Detaloj troviĝas en SES INFORMAS 5/93 paĝo 8)

oo0oo

AMBAŬFLANKE DE LEMANA LAGO

La unuan semajnfino de septembro okazis regiona esperantista renkontiĝo ambaŭflanke de Lemana lago, kio laŭ mia memoro estas unuafojaĵo. Ekkunveni en Laŭzano (en Vaŭdo, Svislando), transŝipi la lagon, plukunveni kaj tranokti en Abondanco (en Savojo, Francio), tio ne estas nura originalaĵo, sed profunda evento, kiu proklamas: ni ne konsideru landlimojn (ĉar iam Vaŭdo kaj Savojo estis samlandaj); ni iru renkonte al najbaraj homoj, pejzaĝoj, historioj kaj kutimoj; ni vidu la mondon el alia perspektivo (do Vaŭdon el la suda lagbordo, dum plej ofte Laŭzano konsideratas kiel etapo al Ĝenevo aŭ al Valezo).

La renkontiĝo dediĉiĝis pluraspekte al Savojo. Historie: memorindas, ke la Savoja ŝtato, kiu ekzistis ankoraŭ pasintjarcente, atingis kulminon de siaj potenco kaj etendiĝo dum la 15a jarcento, kiam ĝi iĝis dukejo. Al ĝi tiuepoke apartenis ĉiuj bordoj de Lemana lago. Arkitekture: vizitiĝis la Laŭzana katedralo, kiel unu el pluraj savojaj atestaĵoj en Vaŭdo. Pentrarte: admiriĝis la elstaraj murpentraĵoj el la glora 15a jc., nun restaŭrataj en la klostro de Abondanca abatejo. Gastronomie: la dudek partoprenantoj malkovris lokan specialaĵon de fandita fromaĝo "Berthoud" kaj buntan bazaron kun mirige varia fromaĝoferto (Kiu kredus, ke savoja Emental-fromaĝo pli bongustas ol la svisa? Mi provis... kaj kredas!).

Certe la semajnfino ne plene rolis kiel svis-franca renkontiĝo ĉar, krom la tri prelegistoj, ĉiuj partoprenantoj venis el la svisa parto de Lemano (de Ĝenevo ĝis Wil!). Tamen nepras laŭdi Séverine Mussard, Pascal Dubourg Glatigny kaj Alain Favre pro ilia serioza, konvinkita kaj fake detala prezento de nia komuna, ĉirkaŭlemana pasinteco.

Andres BICKEL

SES GRATULAS

EDOUARD WALDVOGEL - 100 JARA

La 30an de aprilo 1993, Edouard Waldvogel, la plej maljuna svisa esperantisto, atingis sian centan vivojaron. Oficiale reprezentigis la neŭŝatelaj urbo kaj kantono fare de altrangaj oficistoj. Ankaŭ Claude GACOND kaj Andy KŪNZLI, prezidanto kaj sekretario de Svisa Esperanto-Societo, estis invititaj de la familio Waldvogel ĉeesti la naskiĝtagan ceremonieton en la maljunulejo Clos-Brochet en Neŭŝatelo.

Surbaze de diversaj fontoj, Andy KŪNZLI kompilis la sekvantan biogramon de Edouard Waldvogel.

WALDVOGEL Edouard

La pastro

Naskiĝis la 30an de aprilo 1893 en Schaffhausen. En 1899 lia dulingva (alemana kaj franca) familio translokiĝis al Neŭŝatelo, kie lia patro Samuel Waldvogel estis nomita profesoro de la germana lingvo en gimnazio (latina kolegio). Lia patrino devenis de la neŭŝatela familio Lambert de la Béroche. Edouard Waldvogel estis protestanta teologo, licenciita de la neŭŝatela universitato pri demandoj koncerne la separadon de la eklezio kaj la ŝtato en Francio. 1916-1920 lin engaĝis la franca reformita eklezio por gvidi la paroĥojn en Mazamet (Tarn, suda Francio) kiel flegisto de militvunditoj. En 1920 li estis ordinita kiel pastoro de la paroĥejo de la nacia eklezio en Les Eplatures apud La Chaux-de-Fonds (NE). 1932-38 li aktivis kiel pastoro en Sierre (VS); tiun ĉi dulingvan paroĥojn li forlasis pro idea konflikto kun kelkaj influaj personoj, kiuj ne dividis liajn vidpunktojn en la diskuto pri paco kaj milito. En 1938 li translokiĝis al Estavayer-le-Lac (FR), kie li restis ĝis 1958, la jaro de lia profesia retiriĝo kaj translokiĝo al Chez-le-Bart (NE), kie li pasigis la venontajn 17 jarojn. Sed ankaŭ post lia pensiuliĝo li anstataŭadis laŭpete

pastrojn por diservi, provizore funkciigi diversajn sengvidajn paroĥejojn kaj prezidi la edukan kaj pedagogian centron de Estavayer-le-Lac. En 1974 Waldvogel aliĝis al la sociala institucio 'Foyer de la Côte', kaj depost 1982 li vivas en la maljunulejo 'Clos-Brochet' en Neŭŝatelo. Malgraŭ siaj fruaj fizikaj malhelpoj (precipe surdeco kaj malbona vidkapablo), li estas ankoraŭ konscia kaj lucida. Waldvogel edziĝis en 1929 kun la bernanino Alice Geissbühler (+1954) kaj estas patro de 2 gefiloj.

La idealisto kaj helpanto

Dum sia tuta vivo Waldvogel estis idealisma pacemulo kun sinteno kontraŭmilita. Post lia armedeĵoro en santaĉemento li partoprenis la laboron de la Internacia Civilservo de Pierre kaj Ernest Cérésolle, kadre de kiu li aktivis en Grizono, Valezo kaj Liĥtenŝtejno (1925). En 1941 li apartenis al tiuj helpantoj, kiuj akceptis anojn de la 85a franca armeokorpuso; en aŭtuno 1943 li okupiĝis pri ĉirkaŭ 300 grekaj soldatoj, kiuj estis internigitaj en Italio kaj fuĝis al Svislando. Kun sia edzino li okazigis vesperajn kunvenetojn, dum kiuj la grekoj lernis la francan kaj Waldvogel la grekan lingvon; helpe de Hans Jakob li tiam ankaŭ propagandis E-n. Post la dua mondmilito li organizis kun la E-istoj Fritz Liechti kaj Jules Gilliard helpagadon favore al la malsataj germanoj (tiel nomata Interhempa Servo 1947/48).

La esperantisto

La unuan kontakton kun E Waldvogel havis en 1905 aŭ en 1906 dum aŭ tuj post la 1a UK pere de la patro Samuel Waldvogel (1854-1924; ĉi tiu mem laŭtrecitis E-poemojn) en la familia somerripozejo Uerikon (ZH) apud la zurika lago. En 1907/08 Waldvogel konscie travivis la Ido-krizon. La duan fojon li kontaktiĝis kun E dum la unua mondmilito en suda Francio. Sed nur

en 1927 li definitive aliĝis al la E-movado dum la civilservo en Feldis (GR), akirinte lernolibron de iu franca E-isto. Vintre de 1927-28, loĝante en Les Eplatures, li vizitis E-kursojn gvidatajn de Emma Crisinel kaj Charles Rosen en La Chaux-de-Fonds (NE) kaj baldaŭ aliĝis al la loka E-Grupo, kies prezidanto li poste fariĝis. Kiel E-aktivulo li prelegetis, studis la E-historion, en 1931 en Soloturno trapasis la superan diplomon por instrui la lingvon, organizis la vesperkursojn por senlaboruloj, gvidis la prelegojn de Tiberio Morariu kaj vaste korespondis kun alilandaj gesamideanoj. Pro la UEA-IEL-skismo en 1936 Waldvogel distanciĝis de la movado, sed konvinkita de Gilliard, li revenis al ĝi en 1944 (verkante 'konfeson de reaperanto'). Kadre de la 32a UK en Berno en 1947 li gvidis E-lingvan diservon en la urba katedralo predikante pri 'Se mi parolus la lingvojn de homoj kaj anĝeloj, sed ne havus amon, mi fariĝus sonanta kupro aŭ tintanta cimbalo' (1. Kor. 13/13) kaj kolektis monon por la Interhelpa Servo. Ankaŭ okaze de la 42a UK en Marseille en 1957 li gvidis la protestantan diservon. Fariĝinte ankaŭ aktiva KELI-membro, li ĉeestis kelkajn aranĝojn organizitajn de tiu asocio (ekz. Rüdlingen SH 1953, Münchenwiler BE 1957, Boldern BE 1965). La lastan E-diservon, kiun li celebris, okazis en Melley-Renens (VD) en oktobro 1972 kadre de semajnfino de la romandaj E-istoj. En la 1950aj jaroj Waldvogel aktive helpis ankaŭ al la juna svisa E-junularo.

Ni respektoplene kaj kore gratulas al Edouard Waldvogel!

oo0oo

M E M O R I G O

Ekde la 1-a de oktobro 1993 la Svisa Ĉef-delegitino/UEA havas novan adreson:

**SinJORINO Sonja Brun, ESPERANTO,
WaldegGstrasse 28, 6343 Rotkreuz**

LIECHTI Fritz - 80-jara

Alemano naskita la 10an de aŭgusto 1913 en Steffisburg (BE), de 1950 vivanta en Zuriko. Vizitinte la bazan kaj mezan lernejojn en Uetendorf (BE), li elektis la profesion de elektromekanikisto ĉe la fervojo Steffisburg-Thun-Interlaken (STI) kaj poste laboris en ŝtataj entreprenoj en Thun (BE). Post tio li vizitis la trafiklernejon en Berno, kie li diplomigis. En 1935 li kleriĝis kiel radiotelegrafisto ĉe Radio Suisse en Berno (kiu kontrolis la internacian telegrafan trafikon), la postan jaron instruiĝis por la sama firmao sur la flughaveno Zuriko-Dübendorf, post la finaj ekzamenoj, 1937-40 deĵorante samloke. 1940-50 li aktivis (por la sama entrepreno) sur la flughaveno Altenrhein (SG), radiostacie kontrolante la aertrafikon. 1950-64 li oficis en la aertrafika informado por pilotoj sur la flughaveno Zuriko-Kloten kaj 1964-78 estis ĝia estro. Li kunfondis la internacian informservon por pilotoj (ankoraŭ nun uzatan). Hobioj: naturkuracado kaj kolektado de poŝtmarkoj. Liechti apartenas al la protestanta eklezio. Edzo de Hanny Liechti-Kilchhofer kaj patro de 2 filinoj.

Liechti e-istiĝis en 1944 en kurso de Willy Nüesch en Rheineck (SG), posedas la ateston pri lernado kaj la superan diplomon de SES. Li ekaktiviĝis en 1947 kaj restis aktiva ĝis nun. 1944-50 li membris en la E-Grupo Rheineck (SG), de 1950 en la Zurika E-Societo, 1964-92 funkciante kiel ĝia prezidanto (en 1974 elektita ĝia honora membro, 1992 ĝia honora prezidanto). 1947-50 prezidanto de SES, en 1974 ĝia honora membro; de 1986 li denove apartenas al la CK de SES estante ĝia vicprezidanto kaj de 1991 ankaŭ redaktas la periodaĵon 'SES informas', kiun li lanĉis. Membro de UEA. 1951-77 Liechti prezidis la ĵus fonditan svisan KELI-sekcion, kreis kaj redaktis 'Kristanan Bultenon' kaj organizis kun sia edzino plurajn KELI-kongresojn: en 1953 en Rüdlingen (SH), en 1957 en Münchenwiler (BE), en 1965 en Boldern/Meilen (ZH), en 1979 sur Bienenberg/Liestal

(BL) kaj partoprenis en samaj kongresoj en Pietersberg (Nederlando), Torre-Pellice/Torino (Italio), Lahn (Germanio), krom tio en UK Berno en 1947, UK Munkeno en 1951 kaj UK Lucerno en 1979, sed li ĉeestis ankaŭ la IFEF-kongreson en 1972 en Lugano (TI). Li kunlaboris ankaŭ en la Eŭropaj Ferio-Semajnoj de SAEF: en 1971, 1973 kaj 1975 en Fürigen (NW), en 1974 kaj 1976 en Magliaso (TI), en 1977 en Wengen (BE) gvidante ties superajn lecionojn (kiel tiama ano kaj prezidanto de la Ekzamena Komitato de SES). En 1979 li kunfondis la 'filatelan servon' okaze de la lucerna UK kaj en 1975/76 lanĉis la unuan E-balonon en la mondo. Krome Liechti estas la aŭtoro de la 'Kaseda E-Kurso' por germanlingvaj komencantoj, la unua kaj sola tiaspeca en CH.

Ni kore gratulas kaj bondeziras la jubileanton!

oo0oo

PUBLIKA ESPERANTO-KANTVESPERO EN ZUERICH

Sabate la 18-an de septembro 1993 okazis en Zürich publika Esperanto-Kantvespero, organizita de la Esperanto-Societo Zürich.

Kvardeko da vizitantoj ĝojis pri la prezentaĵoj. Enkonduke Benjamin Chaboudez/Piano, kaj Marion Grosjean/violonĉelo, per tre bela muziko bonvenigis la ĉeestantan rondon.

Poste la kantistoj Klara Mikola kaj Laszlo Garamvölgyi, ambaŭ premiitaj hungaraj artistoj, ĝojigis la ĉeestantaron per diversaj hungaraj kantoj. La muzikan akompanion prizorgis Laszlo Garamvölgyi. La respektivaj aplaŭdoj pruvis la kontentecon de la aŭskultantoj.

La prezidanto de ESZ, s-ro D.Weidmann, klarigis, ke tio estas la unua tia aranĝo de ESZ kaj esprimis la esperon, ke ĝi ne restu la sola.

Dankon al la organizintoj, dankon al la muzikistoj kaj kantistoj. La vespero estis agrabla kaj memorinda evento.

-FL-

oo0oo

AZB
8053 Zürich

PP/Journal
8053 Zürich

IMPRESSUM

Mitglieder-Information Schweiz. Esperanto-Gesellschaft
Aufgeber: Fritz Liechti Wiesliacher 17 8053 Zürich
Herstellungsort: Copy Quick Zürich. 6x im Jahr
Red. Telefon 01/381 77 13

**INTERNACIA
FESTIVALO**

la jarfina aranĝo

jubilea aranĝo

10-a



27 dec 1993 - 3 jan 1994

(Priskribo en SES INFORMAS 5/1993 sur paĝo 15)

oo0oo

Limdato por kontribuaĵoj al SES INFORMAS
1/1994 estas la 6-a de decembro 1993.